Al: Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, ILEI-aktivuloj, TEJO-estraro, redakcioj de gazetoj kaj radiostacioj, listoj kaj unuopuloj.

Estrara Komuniko EKO 2015/11 sendita el Italio la 3an de aprilo

Organizu vian tempon - kun AMO kaj per AMO

La 2an de aprilo ekis la deka seminario de Aktivula Maturigo (AMO) unu jaron post la fermo de la unua. La nuna aranĝo okazas tra kvar duontagoj ene de la Internacia Junulara Festivalo (IJF), aranĝo longtradicia de la Itala Esperanto-Junularo. La gvidantoj por la tuto estas Eliza Popper kaj Veronika Poór, ambaŭ hungarinoj, kiuj praktike vivas en la mondo kaj nemulte hejmlande. Liza eklernis Esperanton en februaro, prepare al la gvidado – ŝi estas profesia trejnisto en eŭropaj junularaj aranĝoj. Liza gvidis la tri-kaj-duonhoran trejnadon tute en Esperanto.
La partoprenantoj nombris 21, el dek landoj -- Britio, Francio, Germanio, Hispanio, Hungario, Italio, Nederlando, Pollando, Slovakio kaj (devene) Vjetnamio.

La seminario povis okazi dank' al movada apogo de UEA kaj TEJO (respondeculo Sara Spanò) kaj ekstermovada subteno de projekto kadre de la programo Gruntvig, kun la pera organizo la Torina Esperanto-Centro.

La temo de la unua tago estis 'tempo-mastrumado'. Efektive, la tempo estis bone mastrumita, por ke malmulto estu decentre organizita, sed emfazis grupan aŭ unuopan taskaron, kun multe da reraportado.

Dum la sinprezentaj komentoj pluraj diris, ke ili tro ofte malŝparas tempon, ekzemple ĉe neesenca komputila uzado. Tro ofte sanprizorgaj agadoj estas forŝovitaj – sportumado, dormado, paŭzado k.s. Facilas mistaksi la tempon bezonatan por taskoj, kaj cedi al interrompoj. La kategoriigo de taskoj estis proponita laŭ tri kombineblaj kriterioj: graveco, urĝeco kaj rapideblo de plenumo.

Sekvas resumo de la diversaj paŝoj de la posttagmezo, kiu bone ilustras la diversecon de la diskutigaj mekanismoj:

1. Ĉiu prezentis sin, kaj en tri frazoj resumis siajn sintenojn aŭ defiojn pri tempo-mastrumado.
2. La grupo arigis vivagojn, kiuj postulas foruzon de tempo: dormadon, manĝadon ktp.
3. Ĉiu unuope taksis, kiom da horoj bezonatas por ĉiu vivago ene de tipa semajno.
4. En kvar grupoj oni analizis la tempo-dividojn de ĉiuj grupanoj kaj identigis problempunktojn.
5. Tiuj problempunktoj venis al diskuto en la pleno kun resumo notita tabule sub ses punktoj.
6. La ses ĉeftemoj (prioritatigo, plurtaskumado, prokrastado k.a.) estis disŝiritaj kaj aldonitaj al novaj malplenaj folioj.
7. Seminarianoj promenis silente, notante frazetojn sur tiom da folioj, kiom ili volis.
8. Oni laboris en ses grupoj, unu por ĉiu folio, por organizi la ideojn: kunigi, forigi, resumi; el tio rezultis nova pli kohera kaj mallonga listigo aŭ diagramo.
9. Unu grupano prezentis dum kvin minutoj al la pleno sian temon; sekvis 5-minuta diskuto.
10. Ĉiu grupo sinsekve prezentis siajn trovaĵojn, kiuj pluiris al diskuto.

Fine okazis resumo en pleno, ĉiu diris po unu/du frazojn: kion utilan vi forportos de la hodiaŭa sesio?

Valoro de la tago? Krom tio, ke naskiĝis nova parolanto de Esperanto, ni traktis temon grava en la granda mondo, kiu rekte rilatas al la ĉiutaga vivo de ĉiu, kaj tamen portas utilon al la ĉiutema kaj Esperanta agado de la seminarianoj.

SMG (kun kontrolo kaj modifoj flanke de Veronika Poór kaj la organizantoj de IJF)

Ni kunvenis, ni paroligis

Venis al bonetosa fino la formala parto de la 8a Mezorienta Kunveno (MK) en Hamameto, Tunizio. Tion oni markis per kuna festa manĝo kun disdono de diplomoj pri kursplenumo. Prelegis lunde Marie-Thérèse Lloancy pri 'Esperanto kaj mia Tunizio', Elizabeth Schwarzer, UEA-delegitino el Berlino pri kontraŭrasismaj seminarioj – pri 'Albert Memmi, rasismo kaj ni'. Memmi estis tunizia verkisto kiu antaŭ cent jaroj pionire esploris la temaron.

Sekvis Xavi Alcade pri 'La rilato inter lingva justeco kaj armitaj konfliktoj', kiu citis multajn ekzemplojn pri tio. Poste prelegis kun bildoj Dorota Parzyszek pri olivarboj kaj iliaj multaj uzoj'.

Fermis la tagon studentoj Sahirĝan kaj Bora kiuj prezentis, kune kun instruisto Murat (sur la foto) la historion de la lernejo UAA en Istanbulo, kiu inkluzivas plurjaran programon de Esperanto-instruado.

Kadre de tiu programo venis invito por la 9a MK, kiun neniu kontraŭis. Laŭ tio, la posta Mezorienta Konveno okazos en Turkio, en spektakle pitoreska regiono en la orienta parto de la lando.

Mardon malfermis Boris Aro (Arrate) pri la E-movado en Kubo, sekvis fakprelego de Encarna Teruel pri 'EMDR: relative nova metodo por la traktado de psikaj traŭmatoj'. Fermis la matenon Stefan MacGill, kiu gvidis diskutojn pri la servoj kaj agado de UEA (kongresoj, revuo k.m.a.) kaj rikoltis utilajn komentojn.

Tra multaj horoj ekzercis la lingvon plejparte junaj studentoj el Tunizio, Alĝerio, Maroko kaj Turkio, sub la gvido de Rafael Mateos (vidu bildojn sekvapaĝe). Li uzis konvenajn pedagogiajn taktikojn, por ke ĉiu regule parolu (eĉ tiuj, kiuj apenaŭ parolis la lingvon antaŭe), kaj por ke la etoso restu pozitiva kaj atentokapta. Nur tiel plurhora kontinua kursumado estas eltenebla. Tiel kreskas modeste grupeto da parolantoj en tiu mondparto.

La kunveno finiĝis per du tagoj da ekskursoj, unu al la sankta urbo Kairouan, la alia al Kartago kaj Tuniso kune kun omaĝa vizito al la muzeo Barda.

Pri la komenco de la 8a MK, ni skribis en Estrara Komuniko (EKO) 10. Tiu aranĝo okazis sub la ombrelo de la regiona agado de UEA. Jen la Asocio okupiĝanta pri tutmondigo de la komunumo kaj pri instruado inter junuloj – alivorte, pri la movada evoluigo.

Paroligisto Rafael ĉiam turnas la atenton reen al la grupanoj, por ke ili ne ripozu, eĉ dum momento.

Boriso Aro estis unu el pluraj valoraj grupanoj, kiuj povis faciligi la fluon per pli alta lingva rego. Cetere Boriso utilis por konservi la bonan etoson, en maniero, kiun nur li kapablas.

Du studentoj el la Magrebo maldekstre, du el Turkio dekstre.

La tuta rondo, kiu diligentis tra multaj horoj ĉiutage.

Fotoj kaj teksto: SMG

Vortoj: 860

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.